# *Panamo oficiale invitis Kubon partopreni la Pintkunsidon de La Amerikoj.*

La panama registaro oficiale invitis la prezidenton Raúl Castro partopreni la pintkunsidon de La Amerikoj okazonta en tiu lando la 10-an kaj 11-an de aprilo 2015, estis informite de la panama ministerio pri eksteraj rilatoj. Kubo estas inter la  landoj kiuj ricevis la unuajn invitojn nome de la panama registaro.

La panama vicprezidento, Luis Miguel Hincapié, “transdonis al la ambasadoroj de Ekvadoro, Salvadoro, Dominika Respubliko, Argentino, Honduro, Paragvajo, Kostariko, Bolivio, Gvatemalo, Kubo kaj Meksiko la invitojn al la kontinenta kunsido.”

En la invitilo, la panama prezidento Juan Carlos Varela esprimas ke la pintkunsido “ser?as i?i spacon de dialogo por renovigo de la kompromisoj de la landoj de la regiono, celante plian proksimi?on kaj kunlaboron inter la popoloj de Ameriko”.

Hincapié asertis ke Panamo ne dubas pri  la partopreno de la 35 prezidentoj kunvokitaj, inter ili Raúl Castro kaj la usona prezidento Barack Obama.

Tiu ?i forumo naski?is pro iniciato de Usono en 1994 por diskuti interkonsentajn agojn en la kontinento.

La ?eesto de Kubo havas la subtenon de ?iuj latinamerikaj landoj kaj estus la unua fojo ke la insulo partoprenus ekde ties establo. La ebla ?eesto de Kubo transformi?is en temon polemikan tial ke Usono kaj Kanado klopodas almeti obstaklojn kaj ?is nun ne konfirmis la partoprenon.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/41177-panamo-oficiale-invitis-kubon-partopreni-la-pintkunsidon-de-la-amerikoj](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/41177-panamo-oficiale-invitis-kubon-partopreni-la-pintkunsidon-de-la-amerikoj)

**Radio Habana Cuba**